

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Pro la malsano KOVIM-19 (COVID-19)

La 8-an de aprilo 2020, nia gubernio Kanagaŭa (inkluzive de la Urbo Jokohamo) estis deklarita kiel “Distrikto en Kriza Stato”, kie kronviroza malsano (KOVIM-19/COVID-19) multe disvastiĝis, ĝis la 6a de majo. Per tiu deklaro, civitanoj estas forte petataj ne iri eksteren, ne kunveni grandaskale. Estas tamen dubinde, ke post monato en majo la situacio draste pliboniĝos. Nia kutima kunvenejo, la Guberniana Centro de Kanagaŭa (Kanagaŭa Kenmin Sentaa) estas fermita en aprilo ĝis dato ne fiksita.

En tia situacio, ni, membroj de Esperanto

Jokohamo: en aprilo tute ne havis/havos kunsidon, inkluzive de enkonduka kurso.

- En majo, se la kutima kunvenejo estas uzebla, okazos kelkaj klasoj, sed ne “Hama-Ronda Vespero”.

- En junio, se la kutima kunvenejo estas uzebla, okazos kelkaj klasoj, sed ne “Hama-Ronda Vespero” nek enkonduka klaso.

- Iuj klasoj anstataŭe havos “hejman laboron”, “retan lernadon”, “retan videokunvenon” ktp.

- La venonta organo aperos en junio, plej frue.

## Al paperaj abonantoj (=Al tiuj, kiuj poŝte ricevas “Novaĵoj Tamtamas”)

Dankon pro via longa atendo. Vi ricevas nian martan n-ron kaj aprilan n-ron samtempe.

Fakte, nia marta n-ro estis farita elektronike jam en marto. Sed la laborloko por presi kaj ekspedi estis fermita de marto pro la COVID-19. Ĉar nia aprila n-ro jam estas preta, ni decidis kune ekspedi ilin al niaj abonantoj. Nia venonta n-ro aperos en junio, kaj ekspedo okazos junie aŭ julie.

Se vi tamen ŝatus ricevi nian gazeton NUR rete, sciigu vian intencon kun via retadreso, al [info@esperanto.yokohama](mailto:info@esperanto.yokohama). Antaŭdankon!

**Se vi tamen kolektas trezore!**

Eĉ se vi poŝte ricevas tiun ĉi gazeton, se

vi zorge kolektas, konservas kaj eventuale ekspozicias la numerojn, ni daŭre sendos al vi perpoŝte.

Tion ni sciis pere de nia korespondo kun s-ro Petr Chrdr el Ĉeĥio. Li transdonadis la numerojn al la Esperanto-Muzeo en Svitavy, 200 km for. Ni do decidis aparte ekspedi nian numeron al s-ino Libuše Dvořáková, kiu zorgas la Esperanto-Muzeon.

Ni aparte dankas s-ron Josip Pleadin el Kroatio. Li promesis aparte surpaperigi nian numeron por konservi en la Dokumenta Esperanto-Centro. Unu avantaĝo estas: nia elektronika versio estas ĉiam kolora, dum nia papera versio povas esti kolora nur malofte.

## humuraĵo

### Kiel vi fartas ? Dum ĉi tiuj tagoj de izoleco kion fari ?

<http://www.yanpetro-kavlan.fr/>

YanPetro Kavlan

Ekzemple :

Ĉi tion demandu :

\***Kiel vi fartas ?**\* : **AL...**

\***Edipo**\*: La demando estas malsimpla.

\***Sokrato**\*: Mi ne scias.

\***Les Kerr**\*: Bonega listo. Dankon !

\***Hipokrato**\*: Sen malsano.

\***Eŭgeno de Zilah**\*: Kiel kutime.

\***Kartezio**\*: Bone, mi pensas.

\***Kavlan**\*: Kviete kaj akvarele.

\***Paskalo**\*: Kaj vi ? Bone mi vetas.

\***Wolfgang Guenther**\*: Estas ja ci virusa plago, kiu katenas min supermezure.

\***Galileo**\*: Ĉio rondiras.

\***Manfred Westermayer**\*: Mi fartas bone, ĉar mi estas optimisto.

\***Vivaldio**\*: Tio dependas de la sezonoj.

\***Zamenhofo**\*: neniam malesperante.

\***Izak Neŭtono**\*: Le demando falas akurate.

\***Andre Albault**\*: Same kiel helpalfabeto.

\***Spinoza**\*: Substance bone.

\***Kurosawa Akira**\*: Vakuon mi kameraos.

\***Vilhelmo Ŝekespiro**\*: Kiel plaĉos al vi.

\***Benjamen Frankleno**\*: Fulmetondre !

\***Robespiero**\*: Ĝis la kapo perdante !

\***Marat**\*: Ĉio banas !

\***Kazanovo**\*: La tuta ĝuo estas por mi.

\***Pitagoro**\*: Tute ortangule.

\***Ludoviko Beoven**\*: Surde.

\***Marquis de Sade**\*: fike efike.

\***D'Alembert kaj Didero**\*: Neeblas respondi per du vortoj.

\***Kanto**\*: Kritika demando.

\***Hegelo**\*: Sume, bone.

\***Arthur Schopenhauer**\*: Ne la volo mankas.

\***Karlo Markso**\*: Estos pli bone morgaŭ.

\***Niccolo Paganini**\*: Allegro ma non troppo.

\***Karlo Roberto Darvino**\*: Oni sin adaptas...

\***Friedrich Wilhelm Nietzsche**\*: Trans

la bono, dankon.

\***Marcel Proust**\*: Donu tempon al la tempo.

\***Maria Kurio**\*: Mi radiantias.

\***Drakulo**\*: Mi havas bonan vejnon.

\***Pikaso**\*: Tio dependas de mia periodo.

\***Sigmundo Freŭdo**\*: Kaj vi ?

\***Alberto Kamuso**\*: la demando absurdas.

\***Cirano de Berĵerako**\*: Laŭ nazvido, bone.

\***Edgar Allan Poe**\*: Eksterordinare.

\***Alberto Ejnŝtejno**\*: Relative bone.

\***Leonardo el Vinĉio**\*: Silente ridetas.

\***Donkiĥoto de la Manĉo**\*: Same kiel la stelo.

\***Hamleto**\*: Farti aŭ ne farti, jen la demando.

\***Napoleono**\*: Nek Aŭsterlice nek Ŭaterlove.

\***Stephen Hawking**\*: En nigra truo.

\***Livani**\*: Fragmente kaj ere.

KAJ

\***VI**\*: **KIEL VI FARTAS ?**

Vi povas plibonigi kaj plilongigi la liston...

Via nomo povas ankaŭ miksiĝi kun la nomoj de pluraj famaj homoj...

Bonan ludon !

(komento : s-ro Kavlan estas franca amiko de s-ino Jana Rambowskova, slovak leganto de nia gazeto. Li afable permesis al ni reaperigi sian humuraĵon.)

